

kontakto

*tutmonda
esperantista
junulara
organizo*

N-ro 4

Volume 2/1965

kontakto

N-ro 4

Volumo 2/1965

Revuo de Tutmonda Esperantista
Junulara Organizo
(Junulara Sekcio de UEA)

Prezo: individua numero - 2,20 ned. gld.
(9 steloj)

Jarabono (minimume kvar numeroj) -
8 ned. gld. (32 steloj)

Redaktoro: Humprey Tonkin,
7 Linnaean Street, Cambridge 38,
Mass., Usono

Teknika redaktoro: Adriaan den Haan
Desegnisto: Jan Schaap

Administrantino: Elly Wijnands

Administrejo, al kiu oni sendu ĉiujn
abonkotizojn, reklamojn ktp.:
Kontakto, Universala Esperanto-Asocio,
Nieuwe Binnenweg 176,
Rotterdam-2, Nederlando

Bankisto de UEA: Mees & Hope,
Blaak 10, Rotterdam-1

Presisto: Drukkerij Zwagers c.v.,
Nieuwe Binnenweg 460, 462,
Rotterdam-6, tel. (010) 25 66 45

Reklamtarifo: La redakcio liveros kon-
traŭ peto. Ekzistas speciala malalta
tarifo por esperantistaj entreprenoj.

Manuskriptojn por Kontakto oni sendu
al la redaktoro en du ekzempleroj.
Ili devas esti klare tajpitaj en
korekta Esperanto, kaj ĉiuj supersignoj
devas aperi laŭ ĝusta formo, se necese
enskribitaj permane. Oni skribu sur
unu flanko de la papero kun interlinia
spaco kaj kun granda maldekstra mar-
ĝeno. Sendu materialon aerpoŝte. Ĉe
leteroj destinitaj al aperigo oni sekvu
la samajn instrukciojn.

La redaktoro aparte bonvenigas arti-
kolojn originalajn aŭ tradukitajn pri
temoj sociologiaj, kulturaj, sportaj kaj
vojaĝaj. Li ankaŭ daŭre bezonas fotojn,
kun aŭ sen artikoloj. Ĉiu materialo
havu iun apartan intereson por la ju-
nularo kaj artikoloj prefere estu ver-
kitaj de gejunuloj mem. Provizore la
redakcio ne akceptas poeziaĵojn.

La redakcio de Kontakto ne akceptas
respondecon por la opinioj esprimitaj
en subskribitaj artikoloj, kiuj ne
necese akordiĝas kun la opinioj aŭ
principoj de TEJO. Por la enhavo de
la artikoloj respondecas nur la sub-
skribintoj mem.

Krome, la redakcio rezervas al si la
rajton mallongigi aŭ alimaniere adapti
subskribitajn artikolojn laŭ sia bon-
trovo.

La fondaĵo junulara gazeto estas
oficiala fondaĵo de UEA kaj ĝia celo
estas subteni la gazeton de TEJO dum
ĉi tiu frua periodo de ĝia eldonado.
Kontribuantojn oni faru rekte al UEA
aŭ ties perantoj, al landaj sekcioj aŭ
al estraranoj de TEJO.

ENHAVO

- 2 Cécile Pérez: La muelejoj
de la metilernantoj
- 4 Madeleine Porquet:
La mondo de la infano
- 7 P. J. Newbould:
Energio en ekologio
- 9 Daniel Kane:
Paĝoj el la pasinteco
- 11 Hans M. Maitzen:
En la kinejon! Kial?
- 12 Armand Su:
La grotaro Lungmen
- 13 Junulino: La arto kunekzisti
kun la gepatroj
- 14 Junulo: La arto kunekzisti
kun la gepatroj
- 15 Mozaiko
- 16 Ferris Hartman: Raporto
Kinsey pri ekzotikaj aŭtoj

”Estus malmultaj kialoj por supozi ke tutmonda socio ekzistas aŭ kreiĝas se oni aŭskultus nur oficialajn komunikojn aŭ legus nur la frontpaĝojn de ĵurnaloj.” Per tiuj vortoj Walter Lippman, doĵeno de usonaj ĵurnalistoj, emfazis la gravecon de rigardado malantaŭ la kulisojn de la mondaj eventoj kaj politikado. Lippman formulis tiujn vortojn kiel unu parolanto en serio da prelegoj prezentitaj en la sidejo de UNO por inaŭguri la Jaron de Internacia Kunlaboro. Li kaj la aliaj parolintoj — el Kolombio, Senegalio, Francio, UAR, Pakistano kaj Sovetunio — klare kaj konstante elmontris la multflankajn praktikajn aktivecojn kiuj kunigas la naciojn kaj kiuj kreas pontojn super la ideologioj. Ili inkluzivas komunan agadon en scienco, en klerigo, en la lukto kontraŭ malsato, en ekonomia helpo, en medicino, en kulturo. Alprenante al si la ekzemplon de Uno, multaj organizoj kaj individuoj dum 1965 donis specialan atenton al internacia kunlaboro, ĝia klarigo al la publiko kaj substrekado de ĝia graveco. Inter ili, la Esperantomovado kaj TEJO ne mankis. Ankaŭ ne mankis aliaj organizoj kaj fakoj kiuj unuavice celas interkomprenon inter la nacioj, kaj estas bone ke ni finu la Jaron per iom da atento al tia organizo. Pro tio, ankaŭ en ĉi tiu numero de Kontakto ni turnas nian atenton al laboro farata por interkompreno, por plibonigi la spiritan kaj kulturen bonstaton de la homaro.

Ĉi-jare, en mondo skuita de krizoj kaj tordita de miskomprenoj, kelkaj homoj atentigis nin pri la silentaj miloj el iliaj kamaradoj kiuj laboras por krei novan, pacan, unuigitan mondon. Je la fino de la Jaro de Internacia Kunlaboro, ni ne forgesu la lecionojn lernitajn, nek perdu la kuraĝon gajnitajn.

Amitié — Amikeco



LA MUELEJOJ DE LA METILERNANTOJ


Ili staras apud la rivero Creuse, meze de Francio, proksimume je 325 kilometroj el Parizo, sur sovaĝa kaj rava kamparo. El tie la homoj foriris ĉar la moderna civilizacio ne plu bezonas malgrandajn muelejojn, kaj, kvazaŭ dormanta belulino, tiuj muelejoj atendis vekigon aŭ morton.

Kaj la vekigo venis. Homo kun granda idealo decidis krei tie centron de amikeco por junuloj el la tuta mondo. Helpe de kelkaj amikoj li ekrestarigis la muelejojn. Jaron post jaro junuloj venis, unue el Francio, poste el ĉiuj partoj de la mondo. Dank' al la komuna laborado novaj pavilonoj kaj grandaj konstruaĵoj estis stari-


gitaj, kaj la junuloj fieras pro la rezultoj, kiujn ili atingis.

Tiuj junuloj venas el ĉiuj medioj: studentoj aŭ manlaboristoj, ili fervore kunlaboras. Sed, ofte, la lingva barilo ne permesas al ili interkompreniĝi, ili povas nur gesti kaj rideti. Pro tio, "Onkĉjo", la iniciatinto de la afero, tre deziras ke Esperanto fariĝu la lingvo de la ĉeestantoj. Li konstruigis la belan pavilonon de Esperanto kiu afable akceptas la vizitantojn per stelo kaj la vorto "Bonvenon". Jam sufiĉe multnombraj esperantistoj venis por labori ĉe la Muelejoj. Estontece ili fariĝos pli kaj pli multaj.

Cécile Pérez




◀◀ (Paĝo 1-a):
La granda jara festo



◀ Laborantoj ĉe Malval. Meze, tenante la tabulon,
Onkĉjo, kiu kreis La Muelejojn de la Metilernantoj

◀ Internacia grupo



▲▲ Piot-Cheniers: ĝenerala panoramo,
kaj materialo por konstruado

▲ La tegmentoj estas elegante kaj
rapide faritaj

◀ Nova pavilono en Malval, la espe-
rantista Muelejo. Dekstre, Onkĉjo

Se vi deziras ĉesti la Mue-
lejojn dum viaj ferioj, bon-
volu peti sciigojn al: S-ino
C. Pérez, 42 rue Rouget de
L'Isle, Châteauroux (Indre),
Francio.



4

La mondo de la infano

Jen kolekto de kelkaj pensoj esprimataj dum printempo, de intimaj konversacioj kaj de enklasaj diskutoj, kiuj esprimas elokvente la starpunkton de la infano antaŭ la mistero de la vivo de la arbo: "Arbo estas farita el ligno; la branĉoj ankaŭ estas el ligno;

komence, ĉe la pintoj de la branĉoj, oni vidas etajn verdajn bulojn: ili fariĝas pli kaj pli grandaj, la folioj elkreskas kaj poste la floroj.

Estas la vento kaj la suno kiuj igas kreski la foliojn kaj la florojn; komence la vento faras: uu,

uu, kaj blovante li puŝas truon en la arbon.

Poste venas la suno; li eniras la arbon per la truo, li supreniras en ĉiun branĉon, li varmigas ĉiun etan bulon kaj la folioj elvenas; sed ne ĉiuj samtempe — unu post la alia, en viceto. Kiam la nokto alvenas, la suno eliras la arbon; tiam la arbo dormas.

Pri la floroj, ili devas atendi multajn tagojn, ili alvenas kiam estas somero. La vento prenas la florojn el sia ĝardeno en la ĉielo, kaj poste li gluas ilin sur la arbojn.

Arbo ne parolas, ĝi estas el ligno, ĝi ne havas buŝon, nek langon, sed kiam estas vento, la branĉoj frapas sur la trunkon kaj oni aŭdas: tok, tok; oni diras ke ili batas la manojn, sed ne, ili diras bonan tagon.

La arbo havas etan pintan nazon, sed li devas ĉiam snufeti, li ne povas uzi la foliojn kiel naztukojn ĉar li ne havas manojn; sed kelkfoje la vento anstataŭas la manojn. En la trunko de ĉiu arbo sin kaŝas tute eta sinjoro kaj la arbo vidas per liaj okuloj. Li rigardas la ĉielon kaj la nubojn, la sunon, la venton, la pluvon, la neĝon la hajlon kaj Sanktan Nikolaon. Li vidas la birdojn kiuj ludas ŝanceladon sur branĉo, li vidas la herbejon kaj en la herbejo la verdajn ranojn kiuj saltas, la papiliojn flavajn, nigrajn, ruĝajn, la kokcinojn, la akridojn, la testudojn, kiuj kviete marŝas kun siaj tegokonkoj surdorse.

La arbo havas verdajn orelojn, pintajn kiel tiuj de kato kaj grandajn kiel tiuj de ĝirafo. Ili aŭdas la peppepon de la birdoj, la venton, la trajnon.... ĉ.... ĉ.... ru-u, la fajron kiu krakas en la kameno, la pin-pon de la fajrobri-gada kamiono, la muzikon de la



muzikistoj kiuj defilas en Kerbenéer, la sonorilojn de la preĝejo: dan.... din.... don.”

Klopodo klarigi magion, ĉi-foje rilate la naskiĝon de bebo:

”Por geedziĝi, paĉjo kaj panjo tenas unu la alian per la mano; ili alvenas la preĝejon, ili eniras, ili eldiras preĝon. Poste, ili cerbumas, ili aĉetas skatolon da dolĉaĵoj, malfermas ĝin kaj trovas la bebon interne.... Estas necese ke la skatolo estu granda, ĝi estas peza.... sed ili estas du por ĝin porti.... Oni malfermas ĝin tute malmulte, oni elprenas la bebon kaj oni tuj fermas ĝin denove.”

Sekvo de epizodo en bildaro, jen portreto de la panjo:

”Panjo havas blankan robon por doni trinkaĵojn al Cécile, grizan robon por iri al la urbo, kaj robon de la koloro de kaŝtanoj, kun floroj — tiel belan, belan — por promeni al la strando aŭ aliaj lokoj.”

Kiam temas pri la suno, ĝi estas temo por kelkaj gustaj komentoj:

”La suno loĝas en la ĉielo, flanke de Sankta Nikolao, en domo el flavaj pajloj, ronda kiel punkto. Ĝi ne havas kamenon, ĉar li neniam frostas. Kiam estas malvarme ekstere aŭ kiam pluvas, li restas hejme....

Por esti ĉiam bone flava, la suno manĝas buteron, la flavaĵon de ovoj, bananojn, flanon....

La vento puŝas lin kaj kiam li volas iri rapide, li saltas sur nubon.... Kelkfoje la luno kaj li ludas ”kaŝu-vin” malantaŭ la nuboj.... Dumnokte, la suno dormas en ruĝa lito, sur matraso kaj kuseno; li ne havas tukojn nek lankovrilojn ĉar li neniam frostas.”

Preskaŭ ĉiam, rakontitaj, travivitaj kaj imagitaj aferoj sin intermiksas: jen oni interpretas la moviĝojn de la maro:

”La maro ne deziras la boatojn. Do, ĝi foriras al la insulo. La boatoj restas solaj en la haveno. La maro venas kaj foriras laŭ la ondoj; la ondoj saltas kaj refalas. Ili rulas sin en la akvon. Sed aliaj ondoj tuj revenas, neniam estas halto, eĉ dum la nokto.”

Ili vidis la kolombojn de la klaso kiuj flugis kun floro en la beko.

Kelkajn tagojn poste:

”La eta birdo ripozas sur bela floro.... La floro estis tute blanka. La eta birdo plukis ĝin, li portas ĝin en sian kaĝon, li manĝas la tigon kaj la foliojn sed ne la petalojn.”

Tiajn observojn plenplenajn je emocioj la infanoj esprimas en siaj desegnoj, siaj modeloj, siaj pentraĵoj, siaj tondfiguroj. Ilia

spirito de inventado krome sin ekzercas en la vera konstruado de objektoj: boatoj faritaj el tabuloj, el ŝnuretoj, el rafio, el korkoj, el bobenoj; panjoj el pajloj, el papero, el ŝtofo; birdoj el ferdratoj, el felto; sunoj el vimenaĵoj, el papero, el rubandoj. Fabrikado de objektoj speciale valora por niaj etuloj kiuj trovas sin en lukto kun veraj problemoj de volumo, de mezuro, de ekvilibro, kaj kiuj solvis ilin solaj, ĉiu laŭ sia maniero, sen eĉ momenta malfortiĝo de sia entuziasmo kiel kreantoj.

En la fina akto de la aventuro, la tapiŝo estos feliĉa sintezo de la riĉeco de la medio, de la komunajo de la infanoj eltrovoj kaj de la zorga ĉeesto de la edukistinoj, la retransviliga mesaĝo de infano kiu serĉas kaj konstruas sin mem kaj kies palpan antaŭeniron ni gvidas per atenta tenero.

Madeleine Porquet



ENERGIO EN EKOLOGIO

Ĉiujare la monda enloĝantaro pligrandiĝas je kvindeko da milionoj, kaj por ĉiuj necesas nutraĵo. Oni kutime rigardas tion agrokultura problemo sed mi volas ĉi tie argumenti ke ĝi ankaŭ estas ekologia problemo. Ekologio estas la scienco kiu ekzamenas la rilaton inter plantoj, bestoj kaj ilia medio; do ni povas rigardi ĝin kiel inkluzivantan agrokulturon, arbokulturon kaj fiŝkaptadon.

Kiel multaj sciencaj fakoj, ekologio trairis plurajn fazojn: priskriban fazon (Kiu plantoj kaj bestoj aperas en tiu aŭ alia ĉirkaŭo?); kvantan fazon (Kiom da ili aperas tie?); kaj nun funkciajn fazojn (Kion ili faras, kio okazas en la ekosistemo?). Tiun ĉi unuon de ekologio, la ekosistemo, konsistigas la komunumo de plantoj kaj bestoj kiun oni trovas en iu difinita loko, plus la grundo (kaj la akvo se oni pritraktas fiŝojn), kaj la loka klimato.

La plej grava aktiveco en iu ajn ekosistemo estas la fluo de energio. La baza ideo estas simpla. Verdaj plantoj ensorbas energion de la sunlumo. Iom de tiu energio uziĝas en konstruo de organikaj komponaĵoj el karbondioksido kaj akvo dum ĉeesto de klorofilo. Tiu procedo nomiĝas fotosintezo. Per fotosintezo plantoj fiksis kaj konservas energion en la formo de multenergiaj komponaĵoj kiel amelo, celulozo, proteino kaj tiel plu. Kelkaj tiuj komponaĵoj uziĝas por formi novan plantmaterialon; tio estas, ili kontribuas al la kreskado de la planto. Sed parto foruziĝas simple por teni la planton viva, spiranta kaj funkcia.

Do, areo de starantaj vegetaĵoj fiksis kaj konservadas energion. Arbara incendio prezentas subitan liberigon de tiu konservita energio: feliĉe ĝi kutime liberiĝas pli malrapide per du aliaj vojoj, kiujn ni povus nomi la konsumo vojo kaj la malkompono vojo. Kiam temas pri la konsumo vojo, la vivan plantmaterialon manĝas iu herbivora besto, ekzemple raŭpo, aŭ kuniklo, aŭ bovino. Kaj siavice tiun beston eble manĝas karnomanĝa, aŭ karnovora, besto, kiun eble fine manĝos alia karnovorulo.

En la malkompono vojo, mortinta plant- aŭ bestmaterialo estas uzata kiel nutraĵo de bakterioj kaj fungoj, aŭ de grundanimaloj kiel lumbrikoj. Je ĉiu paŝo en ambaŭ vojoj la procedo de energitransigo estas baze simila. El la nutraĵo mangita de besto la pli granda parto estas uzata por teni la beston viva, kaj el la cetero parto utiligas por

formi novan korpan historion ĉu en kreskado ĉu en reproduktado.

Je ĉiu stadio en la natura ĉeno, energio forperdiĝas per la vivprocezoj, la spirado, de la konsumanta organismo. La diferenco inter la energia enpreno de besto en formo de nutraĵo kaj la produkto de nova bestmaterialo nomiĝas la transiga perdo; kaj mi emfazas ke tiuj transigaj perdoj estas senescepte grandaj. Se oni imagas ke herbo ekvivalenta al 100 kalorioj da energio foruziĝas por formi dek kaloriojn da herbivorula karno kiu siavice formas unu kalorion da karnovorula karno, do jen la ĝusta sento de proporcio.

Kiel mi diris, la plej grava procedo en ĉiu ekosistemo estas la fluo de energio. Esence ĝi estas unudirekta procedo, iompostioma foruziĝo. Estas ankaŭ vere ke la sistemo povas funkcii dum iom da tempo pere de konservita energio, sed por daŭri longan tempon necesas enigi kaj fikso de plia suna energio per fotosintezo.


En tiu unudirekta fluo ekzistas evidenta kontrasto inter energio kaj materialo, ĉar materialo povas daŭre cirkuli en la ekosistemo. Simpla ekzemplo de tio estas la suprenpreno de mineralaj saloj el la grundo fare de plantaj radikoj. El la radikoj ili iras al la folioj; la folioj falas, malkomponiĝas, kaj la mineraloj reeniras la grundon kie ili denove disponiĝas por nova ciklo. Kiam farmisto aldonas mineralan sterkon al siaj kampoj, li aldonas al la cirkulado de mineralaj nutraĵoj, kutime en klopo kompenso tion kion li forprenis per rikoltaĵoj. Pluvo alportas kelkajn mineralojn en solvaĵa formo sed ili plejparte perdiĝas en la drena akvo. Profunda vetera erodo de grundo kaj roko ankaŭ havebligas pli da mineraloj al plantoj. Fakte, kiam temas pri mineralaj nutraĵoj la grundo estas plej esenca. Ĉio trairas la grundon: la folioj de la arboj, la mortintaj plantoj kaj bestoj, la bestaj fekaĵoj, ĉiuj falas sur la grundon, miksiĝas kun ĝi kaj malkomponiĝas, tiel liberigante siajn mineralaĵojn. Unu aparte grava ekzemplo de minerala ciklo rilatas al la studado de radioaktiva polvo, ekzemple la cirkulado de Stroncio 90. Tiun radioaktivan izotopon enprenas plantoj speciale el acidaj grundoj kie ne estas multa kalcio. Ĝi transiras de radikoj al folioj, kiujn eble ŝafoj manĝas. Tiam la Stroncio 90 komencas akumuliĝi en la ostoj de la ŝafoj.

Tamen, iu ajn komponaĵo kiu estas tiel stabila ke ĝi ne facile malkomponiĝas povas cirkuli en la ekosistemo. Unu

grupo de insekticidoj, la kloraj hidrokarbonaĵoj kiel aldrino aŭ DDT, estas tre stabilaj, kaj emas persisti en ĉiu ekosistemo en kiun ili enkondukiĝas. Je la nuna tempo DDT kaj similaj komponaĵoj daŭre akumuliĝas en multaj grundoj. Ankaŭ ili povas pasi laŭ la nutra ĉeno kaj ili emas ĉe la fino plikoncentriĝi en la karnovoruloj. Estas nun pli-malpli klare, ekzemple, ke malaltiĝis la nombro de rabobirdoj, interalie nizoj, pro la plioftiĝanta uzado de tiuj kloraj hidrokarbonaj insekticidoj.

Ni transiru al io malpli sombra.... Alia komponaĵo kiu cirkulas en ekosistemo estas akvo. La ĉefa liveranto de akvo estas pluvo. Akvo perdiĝas laŭ du vojoj: per forfluo aŭ dreniĝo, kaj per vaporiĝo. Gravas kaj al natura vegetaĵo kaj al rikoltaĵo ke la grundo povu akcepti kaj konservi akvon. Fakte, ĉe rikoltaĵo tio estas unu el la ĉefaj kialoj de kultivado de la grundo. Oni povas mezuri tiujn funkciajn karakterizojn de ekosistemoj kaj uzi ilin por kompari tion kio okazas en diversaj sistemoj. La ebleco kompari estas tre grava. Oni nun kapablas fari komparojn inter aferoj tiel diversaj kiel, ni diru, oceano, kampo kaj arbaro, ĉar ili ĉiuj estas ekosistemoj kiuj ensorbas kaj utiligas sunan energion, kaj en kiuj tiu energio poste fluas laŭ difinitaj vojoj.

Ekzemple, ni povas proponi la ekonomian demandon: Kiu sistemo plej efikas en la fikso de suna energio? Se aliaj faktoroj estas egalaj, ŝajnas, ke en moderklimataj regionoj ĉiamverdaj arbaroj estas pli produktivaj ol savano. En oceano la plejparto de la fotosintezo faras etaj verdaj alĝoj, kaj, rilate la kvanton de fiksitaj energio, oceano emas malpli efika ol landa vegetaĵo — kondiĉe ke tie ĉi ĉiam estas adekvata akvo por plantkreskado. Kiam ni konsideras pli precize la sorton de la energio fiksitaj en tiuj ĉi tri kazoj, ni konstataj ke la situacio estas tute malsimila, depende ĉu temas pri arbaro, kamparo aŭ oceano. En arbaro, bestoj manĝas relative malmultan vivan plantmaterialon, kaj plejparte ĝi tuj eniras la malkomponan nutroĉenon. En kampo estas relative mallonga konsumo nutroĉeno — de herbo ĝis bovino estas tipa ekzemplo — kaj ekzistas aktiva malkompono nutroĉeno sub la tero. Efektive, la pezo de grundanimaloj, ekzemple lumbrikoj, en bona paŝtejo estas ofte pli granda ol la pezo de la ŝafoj aŭ bovinoj, kiujn subtenas la paŝtejo. En oceano estas



longa konsumata nutroĉeno; malgrandaj animaloj, la zooplanktono, manĝas la algetojn. La zooplanktonon manĝas fiŝetoj. La etan fiŝojn manĝas pli grandaj fiŝoj, kaj tiel plu.

La tri ekosistemoj, kiujn mi menciis, estas ĉiuj ekspluatataj de la homo. De la arbaro li prenas rikolton de ligno; tio estas, li rikoltas la primarajn produktantojn. Tiumaniere li elprenas el la sistemo la plej grandan kvanton da energio kiu eblas. En la ekosistemo de la herbo kaj bovino la homo rikoltas la herbovorulon, en formo de viando aŭ de lakto. La bovino promenas, elektante la plej bonan herbon, kaj tiumaniere koncentrigas la proteinojn produktitan laŭ iom vasta areo. Tio estas aparte efika en kazo kie la produktiveco estas ĉiokaze relative malalta; kaj la produktaĵo, la viando aŭ lakto, estas konvena manĝaĵo. Sed kontraŭ tio la rikoltaĵo estas nur eta parto de la primara produktado pro la transiga perdo de la bovino. Kie oni devas teni brutojn en ŝirmejoj kaj oni utiligas ilin por koncentrigi la proteinojn (en plantmaterialo) kiun oni enportas al ili kaj manĝigas al ili, verŝajne oni povus fari pli ŝparan transigon per rekta enmeto de la nutraĵo en maŝinon, kiel sugestis N. W. Pirie el Rothamsted, aŭ eble per iu biologia sistemo kiu utiligas bakteriojn. Sed tiam la produktaĵoj, kvankam nutraj, eble ne aspektus, aŭ gustus, kiel bovaĵo aŭ lakto.

En la oceano la homo ofte ekspluatadas karnovorajn fiŝojn kaj ofte la nutroĉeno estas longa. Do la transigaj perdoj inter la algoj kiuj unue fiksis la energion kaj la fiŝo sur la tablo de la fiŝvendejo estas tre grandaj. Nuntempe ni tute simple ne ekspluatadas la akvon, ĉu salan ĉu freŝan, eĉ proksime al la maksimuma grado. Ekzistas, ekzemple, la ebleco de fiŝfarmado, kaj la pli fora estonteco eble alportos pli profundajn ŝanĝojn per la rekta rikoltado de planktono je komerca skalo.

Evidente la rapidega pligrandiĝo de la monda loĝantaro kreas krizon en la rilato de la homo al lia natura medio. Eble ĝi jam tion faris. Tio esprimiĝos ne nur en manko de nutraĵoj sed ankaŭ en la maniero laŭ kiu la homo detruadas la agrablan medion en kiu li vivas. Tio proponas defion al ĉiuj specoj de sciencistoj, kaj unu maniero laŭ kiu biologoj akceptadas tiun defion estas la Internacia Biologia Programo kiun oni nun planas. La temo de tiu ĉi programo estas biologia produktivo kaj homa bonfarto, kaj ĝi inkluzivos konsiderindan esploron de tiuj aferoj kiujn mi jam diskutis.

Ĉiujare agrokultura teknologio produktadas pli grandajn redonojn interne de la tradicia kadro; sed mi kredas ke alvenis la tempo por ekzameni tiun kadron, rigardi denove la bazajn principojn kiuj kuŝas en ĉiu sistemo de transigo de suna energio, ĉu en oceano, arbaro, fruktarbustaro, plugita kampo aŭ paŝtejo. Oni povas nun fari funkciajn analizojn de ĉiuj tiuj sistemoj per la metodo kiun mi proponis — ili ĉiuj estas sistemoj de energifluado bazitaj sur la fiksado de suna energio fare de verdaj plantoj, kaj ĝia posta forperdiĝo laŭ konataj vojoj. Studado de la maniero, en kiu naturaj ekosistemoj funkcias, malkovros ideojn utiligeblajn en la regado de homfaritaj sistemoj. La studo de transigaj perdoj eble sugestos al ni, je kiu nivelo ni plej profite rikoltu. Studado de mineralaj cikloj eble sugestos, kiujn elementojn ni reenmetu en la sistemon; kaj tiel plu.

La pluvivo de la homo dependas de lia kapablo prizorgi kaj utiligi siajn naturajn rimedojn, tio estas, lia natura medio. Praktike, la media unuo estas la ekosistemo, la plantoj, bestoj, grundo kaj klimato kunigitaj en unu loko; kaj temas nur pri ordinara prudento se oni sugestas ke por utiligi ekosistemojn plej efike oni klopodu unue eltrovi kiel ili funkcias.

P. J. Newbould

LERNEJAJ ABONOJ

DE KONTAKTO

Kontakto estas kutime abonebla kontraŭ 8 guldenoj jare, sed TEJO pretas disponigi la gazeton al lernejanoj kontraŭ jarkotizo de nur 2,50 guldenoj (10 steloj).

Tion TEJO faras simple por helpi en la livero de taŭga legmaterialo al lernejanoj kiuj lernas Esperanton.

Kontakto taŭgas por la pli aĝaj lernantoj (14-jaraj kaj pli) kaj por, ekzemple, anoj de instruistaj seminarioj.

Tiaj abonantoj devas esti lernantoj de Esperanto en oficiala kurso de iu lernejo. Oni devas samtempe pagi minimume 10 abonojn kaj sendi al la administracio de **Kontakto** atestilon sur oficiala skribpapero de la koncerna lernejo, kun informo ke ili estas destinitaj al oficiala Esperanto-klaso en tiu lernejo, kaj kun subskribo de la koncerna respondeca persono. Ni ne povas disponigi ekzemplerojn je ĉi tiu favora prezo al neoficialaj kursoj aŭ nelernejaj klasoj. Ĉiuj ekzempleroj por unu lernejo estos kune ekspeditaj en unu pakajaĵo.

Individuajn numerojn ni povas liveri laŭ samaj kondiĉoj kontraŭ prezo de 3 steloj (0,75 ned. gid.) por unu ekzemplero.

SYDNEY

And New South



GAZETTE,

Wales Advertiser.

PUBLISHED BY AUTHORITY.

Vol. I.

SATURDAY, MARCH 5, 1803.

Number 1.

It is hereby ordered, that all Advertisements, Orders, &c. which appear under the Official Signature of the Secretary of this Colony, or of any other Officer of Government, properly authorised to publish them in the SYDNEY GAZETTE, AND NEW SOUTH WALES ADVERTISER, are meant, and must be deemed to convey official and sufficient Notifications, in the same Manner as if they were particularly specified to any ONE Individual, or Others, to whom such may have a Reference.

By Command of His Excellency the Governor and Commander in Chief, WILLIAM NEATE CHAPMAN, Secretary.
Sydney, March 5th, 1803.

General Orders.

REPEATED Complaints having been made of the great losses sustained by the Soldiers at Hawkesbury, from the vexatious

read to the Guard on board the Supply Hulk.

By Command of His Excellency W. N. CHAPMAN, Sec. Government House, Feb. 21, 1803.

To be distributed to such Persons as the GOVERNOR may think proper to grant Permis to, 1000 Gallons. The above to include the Civil and Military Officers at Norfolk Island.

Paĝoj el la pasinteco

Ciam estas interese rigardi en la vivon de pasintaj generacioj pere de dokumentoj postlasitaj. Per oficialaj dokumentoj, personaj leteroj aŭ tiamaj gazetoj, oni povas lerni multon pri la vivo de la tiam nova kolonio kiu nun fariĝis la moderna lando Aŭstralio.

Antaŭnelonge estis publikigitaj foto-reprodukte la unuaj numeroj de la unua aŭstralia ĵurnalo The Sydney Gazette kaj tiuj donas interesan kaj informan enrigardon en la vivon de la unuaj enmigrintoj.

Oni konstatas, ke tiu vivo estis tre malfacila kaj ofte tre severa — kaj multaj apenaŭ supereblaj problemoj abundis. Malgraŭ tiaj malfacilaj problemoj, la interesoj kaj sentoj de la unuaj koloniistoj multilate similas la niajn.

La ĵurnalo estis semajna. Ĝi estis malgrandformata, kaj enhavis kvar paĝojn. Kelkloke ĝi jam estiĝis apenaŭ legebla — pro la inko, kiun la redaktoro mem fabrikis, kaj la presilo, kiu estis mane funkciigita. Malmultaj ekzempleroj ĝisvivis hodiaŭ, kaj kompletaj serioj ekzistas nun nur du.

La redaktoro, raportisto, presisto, agento kaj vendisto de la Sydney Gazette, kiu pro ŝajna delikto estis mortpunita, sed anstataŭe transportita en Aŭstralion, estis George Howe. Unue li estis oficiala presisto, poste li

estis dungita kiel redaktoro por la Gazeto. Poste li presis la unuan libron presitan en Aŭstralio (regullibron), kaj ŝuldigis al li la ekesto de la unua bildgazeto, kies unua numero estis eldonita unu semajnon post lia morto. La redaktoro raportis ĉiaspecajn novaĵojn — gravajn kaj malgravajn el la Kolonio, gravajn kaj interesajn el eksterlando, kaj ĝeneralajn informojn. Malgraŭ ĉiaj malfacilaĵoj — strikta cenzurado fare de la registaro; ega malaktualeco de eksterlanda novaĵo kaj ne ĉiam fidindaj raportoj — Howe kapablis doni al sia gazeto ekvilibron kaj eĉ leĝeran (kvankam seriozan) etoson.

La teorie plej grava malfacilo de la redaktoro estis la neregula kaj malfruaga alveno de alilandaj novaĵoj. Pro tio la legantoj devis atendi por ekscii, ke "Londona ĵurnalo raportas, ke Lia Moŝto suferis severan malsanon pro gala malsano, post kiu, ni tre ĝojas aldoni, li baldaŭ resaniĝis" — sep monatojn poste! Pli gravaj anoncoj egale malfruis. Ses monatojn post militdeklaro (inter Francio kaj Anglio), oni sciigis pri ĝi en Aŭstralio. Poste estis raportite, ke la Guberniestro apelacias por volontuloj por prepariĝi kontraŭ atako de Napoleono, "malgraŭ la verŝajno, ke atako de la Malamiko

ne estus ebla en tiu ĉi fora loko de la mondo".

Reklamoj kaj anoncoj abundis. Kelkaj el la anoncoj estas iom amuzaj pro sia formo: "La Persono kiu prunteprenis la Libron T- el la Domo de Simeon Lord estas petata tuj redoni ĝin." Aŭ, pli rekte: "Perdita: arĝenta Poŝhorloĝo... redono akiros rekompencan je du pundoj. Se ĝi ne estas redonita tuj, ĉia peno estos farata por trovi tiujn, kiuj kaŝis ĝin, kaj tiuj estos traktataj laŭ la leĝoj."

La ĉefa reklamanto estis Simeon Lord, nuntempe fama kiel la unua negocisto en Aŭstralio. Sed ankaŭ personaj reklametoj aperis. Kiel: "Greka Lek-sikono kaj Hebrea Vortaro serĉataj — kontaktu la Redaktoron", kaj ŝajne de la sama persono: "Libroj Italaj kaj Hebreaj serĉataj." Ne mankis limigita kulturo inter la Kolonianoj.

Sed se ne mankis kulturo nek informo nek humoro — ŝajne mankis religiemo, laŭ la jeno: "La Malatentemo de la malaltaj Plebanoj rilate la Devojn de la Dimanĉo estas tia nune, por necesigi eksterordinarajn Rimedojn. Personoj en ĉiuj Partoj de la Urbo malkaŝe okupas sin pri siaj kutimaj dum-semajnaj Taglaboroj — kaj aliaj eĉ pli ŝatas promeni sencele tra la Stratoj ol ĉeesti Dian Servon. Pluraj el tiuj

HEROLDO

DE ESPERANTO

LA PLEJ POPULARA SENDEPENDA INTERNACIA ESPERANTO-ORGANO

De 45 jaroj je la servo de la Internacia Lingvo

- ☆ 19 numeroj jare
- ☆ Aktualaj ilustritaj raportoj el la tuta mondo
- ☆ Kultura paĝo pri literaturo, arto, muziko, sporto, kinoarto, ktp.
- ☆ Duobla Kongresa numero
- ☆ Libera Tribuno de la legantoj

Abonebla ĉe la Landaj Perantoj aŭ ĉe UEA

jarabono: 4 \$ (55 steloj)

Mendu provnumeron ĉe la Redakcio: 13 rue de la Reinette — Pippelingstraat, Bruselo 1

Redaktorino: Ada Fighiera-Sikorska

Paĝoj el la pasinteco

Lastaj estis arestitaj ordone de la Magistratoj, sed poste ili estis parole punitaj kaj tiam liberigitaj, post ilia promeso pri Pardonpeto al Dio.”

Kiel hodiaŭ, leteroj al la Redakcio aperis. Kaj kiel hodiaŭ, plejparte plendaj. Unu saĝulo akre kritikis tiujn, kiuj aperigas ”grandegajn truojn” meze de la strato pro diversaj kialoj. ”Kelkaj el la stratoj de Sidnejo jam fariĝas netrapaseblaj — nur se oni riskas kolfrakason... mi mem enfalis en unu el tiuj truaĉoj kontraŭ kiu mi ne gardis min... la proksiman tagon mi vidis viron apud tiu sama ĉerkujo en kiun mi mem falis... li klarigis, ke per tiu tero elfosita el la publika vojo li platis sian ĝardenon.”

Oni atendis ke la Redaktoro raportu senopinie la novaĵon — ĝenerale sen aldona komento — kaj eĉ subtenu la agojn de la Registaro en certaj okazoj. ”Ni ne lasas vojon al politika Disku-

tado aŭ persona Malamikemo: informado estas nia sola celo,” skribis Howe en la unua numero. Ofte artikoloj temis pri ”hontindaj kaj abomenindaj krimoj” (kiel la prirabo de la domo de oficisto, en kiu nenio valora estis ŝtelita); pri la mortigo de krimuloj kiuj ”malnoble kaj malkuraĝe suriris la eŝafodon”, aŭ pri novaj reguloj de la Administracio, rilate komercon, distribuadon de brando, praktikon de la katolika religio kaj falsajn monbiletojn.

Ne mankis ĝeneralaj artikoloj: la Redaktoro ĉiam enmetis ekzemple artikolojn pri vin- kaj brandofarado kaj konservado, rimarkojn pri la prizorgo de taglibro, aŭ ion pri terpomkulturo. La Kolonio estis ankoraŭ por-krimula: multaj kruelaĵoj kiujn oni ofte raportis nin ŝokas nun, sed ŝajne tiam estis la kutima puno kvindek vipbatoj pro mallaboremo aŭ simila delikteto. Estas sciante, ke poste du soldatoj estis ĝismorte vigitaj pro

intenca ”malhonora ekŝigo” el la armeo. Laŭ onidiroj, tiaj aferoj okazis ankaŭ antaŭe, sed oni ne menciis ilin en la ĵurnalo, pro la strikta cenzurado.

Ĉiukaze legado de tiuj ĉi unuaj gazetoj donas sufiĉe interesan kaj fidindan envidon en la ĉiutagan vivon de la enmigrintoj (plejparte devigaj) je la naskiĝo de la lando. Por studentoj kaj alilandaj interesitoj tralegado estas certe tre interesa; sed por la posteuloj aŭstraliaj — multaj el kiuj estas idoj de tiuj unuaj — ĝi estas legaĵo foje amuza, ĝenerale tre interesa, kaj krome foje emociiga. Per tiuj dokumentoj oni plej bone eklernas pri la enmigrintoj kaj liberigitaj ”krimuloj” kiuj faris siajn hejmojn en Aŭstralio malgraŭ ĉiaj malfacilaĵoj, malhelpoj kaj kruelaĵoj de la tiama vivo.

Daniel Kane

En la kinejon ! . . . Kial?

La jena estas rezulto de enketo farita en la ĉefurbo de Aŭstrio. Interese estus, ĉu la tuto ankaŭ simile okazas en aliaj landoj aŭ kiaj modifigoj troviĝas aliloke. La kinovizitantoj ŝajne sekvas al tre mistera inklino, se ili decidiĝas rigardi filmon.

Demandite pri la **kaŭzo de ĝuste la nuna kinovizito**, naŭ el dek personoj respondis: "...ĉar mi ĵus havas tempon"; kelkaj rimarkis, ke ili tro enuas, aliaj nur volis "iomete malstreĉiĝi". Juna sinjoro diris, ke ĵus ne plaĉas al li la laboro, tial li iras en filmteatron (se tion sciis la estro!). Banala, sed tamen origineca aŭdiĝas la konciza komento de juna snobo: "...ĉar pluvantas". Unu sola iris en kinejon, ĉar li volas vidi certan filmon. Maljuneta sinjorino celis per filmrigardado perdi dolorojn (imagi nur: Audie Murphy kiel dentkuracisto).

3 jurstudintoj, ĵus finintaj la jurkurson volis tiun okazon festi en filmejo.

niaj humoristoj 4

La sekva demando estis: **Laŭ kiuj vidpunktoj vi elektas, se vi intence elektas, iun filmon alioke?**

"La ĉefaĵo estas la geaktoroj!" diris aĝeta sinjoro tuj fierege raportante, ke li parencas al Deborah Kerr (en kioma grado, ni ne sukcesis konstati).

Unu inteligente eldiris: "Lunde mi principe nur vidas stultajn filmojn".

Metilernanto amare plendegis: "Se mi akompanas mian 'katinon', mi devas rigardi bonajn filmojn, ŝi (la katino) tiel volas."

La tria demando: **Ĉu vi atentis dum la filmo al la tielnomata bildlingvo, al kameromanipulado, bildelektado ktp?**

La respondoj: "Jes", "jes", "ne", "ĉiukaze", "mi rimarkas nur la malbonajn kulisojn", "kompreneble jes, mi ja deĵoras en la televido", "ĉu mi estas stulta? Mi ja volas amuziĝi" (originala diraĵo de jun-beatlo).

La vera sensacio de la enketo estis: la homoj ne ŝatas "seksumon" en la filmo! ("Ĉar mi ĝin ja havas hejme!")

Kelkaj diris, ke filmo plenumu tion, kion ili atendis pri ĝi. Ĉar tio estis iomete ĝenerala por ni, ni volis precizigon, do **kion ili fakte atendas**: "Ne multe" aŭ "malfacile direbla" estis la ĉefvoĉo de la intervjuitaj viktimoj. Tiuj respondoj tre riĉigis nian scion.

"Bona filmo neprege havu ion dramecan" (nervoza sinjorino mezaĝa). Kion ŝi komprenas sub tio? "Nu jes, tute klare, ion dramecan, ĉu ne?"...

Mekanikisto respondis al la demando pri la kialo de sia kinovizito: "Mi volas iri en la kinejon. Kiam li alioke rigardas filmon? "Kiam mi volas iri en kinejon." Ĉu li atentis la teknikan formon kaj plenumon de la filmo?

"Ne, ĉar mi volas iri en kinejon." Post tio ni ĉesigis la intervjuon relasante mirmirantan demanditon.

Alia demando:

Ĉu vin interesas la altnivela, arte valora filmo?

Kelkaj atribuis al tiu filmspeco almenaŭ la ekzistrajton, malgraŭ la fakto, ke ili ankoraŭ ne vidis ion tian.

Unu diris, ke ekzistas bonaj kaj malbonaj filmoj, fakto ĝis nun nekonata al ni.

Iu sinjoro asertis, ke nur kolor-filmoj estas artverkoj.

Iu sinjorino konfirmis, ke nur francaj produktaĵoj valoras; italaĵ aliflanke laŭ ŝia apinio estas kompletaj fuŝaĵoj.

Iomete timigite pri la abundo de saĝaj respondoj ni riskis ankoraŭ lastan demandon:

Ĉu la filmo estas serioza kaj emancipita artokampo?

Ĉefe oni jesis. Kelkaj esprimis, ke la filmo ne havas la saman nivelon kiel la aliaj artproduktoj. Unu kontraŭe atribuis superan pozicion al ĝi, ĉar la "filmo havas pli vastajn teknikajn eblecojn". Preskaŭ emociige efikis la respondo de junulo, "la filmo estas ne nur kulturfaktoro, sed ĝi havas la funkcion de morala institucio (vidu Schiller), kies ĉeftasko estas la vekado kaj favorado de la bono en la homo"....

La lasta respondo iomete konsolis la suferintajn intervjuitojn, kiuj jam trapasis multon kaj jam al kutimiĝis al:

1) junaj inoj, kiuj ne sufiĉe volis esti demandataj kaj kiujn ni ankoraŭ horojn (noktajn...) povus esti demandintaj

2) viroj, inverse, kiuj volis per la batalokazo: "Lasu mian katinon!" salti al la rapide fuĝanta intervjuanto.

Profunde trafite ni retirigis finfine pro la aserto de sinjorino, kiu absolute miskomprenante niajn intencojn deturnis sin kun la demando: "Ĉu tio estas la nova metodo por mallerta ekamindumprovo?"


La grotaro

Lungmen

La Grotaro Lungmen estas unu el la plej grandaj grotaroj en Ĉinio. Ĝi delonge famigis pro la altega artvaloro kaj la grandiozeco de la ŝtonaj budhoj skulptitaj el la vertikala roksurfaco. Aŭtune de 1964, mi havis okazon viziti tiun ĉi grandiozan grotaron, kiu situas proksimume 25 kilometrojn sude de la antikva ĉina urbo Lojang (Honan-provinco).


Post proksimume unuhora veturado, nia aŭtobuso haltis ĉe la longa kaj tre bela ponto, sub kiu trafluas la rivero I-Sue. Ambaŭflanke de la rivero estas du longaj kaj altaj ŝtonmontoj vidalvide, kiuj formas la naturan riverpordon, Pordo de Drakoj (Lungmen). Ambaŭ montoj — la Okcidenta Monto kaj la Orienta Monto — estas tre krutaj. Nome, sur iliaj klifoj troviĝas sennombraj grotoj, kiuj formas la mondkonatan Grotaron Lungmen. Tiuj ĉi grotoj komencis konstrui en la 5-a jarcento p.K., en la Norda Vej-Dinastio. Tiutempe budhismo en Ĉinio estis en sia plej prospera periodo. Kaj tra la sekvintaj dinastioj la budhoj kaj la grotoj pliiĝis kaj pliriĉiĝis per daŭra elskulptado. En iu antikva ĉina libro pri Lungmen estis notite, ke en Lungmen estas entute 97360 ŝtonstatuoj de budhoj. Sed el la nuna statistiko ni eksciis, ke entute 1352 grotoj estas bone konservitaj, kaj ankaŭ 39 pagodoj kaj 750 niĉoj. Nur laŭ tiu ĉi simpla statistiko, oni jam povas imagi, kiel grandioza estas la Grotaro Lungmen.

Mi grimpis sur la monton kaj admiris la budhajn statuojn grandajn kaj malgrandajn tiel bele skulptitajn kaj ĉizitajn en kaj ekster la grotoj. Ĉiuj budhajn statuoj ne estas tute senanimaj. Ili havas la proprajn esprimivajn mienojn kaj vivajn sentojn, kaj diferencas unu de alia. La Grotaro



Lungmen ne nur atestas la gloran skulptarton en Ĉinio, sed ankaŭ la klarecon kaj saĝon de la laboro de la popolo de la antikva Ĉinio. Post zigzaga rampado mi fine ekvidis la plej grandan ŝtonbudhon Luŝena. Ĝi altas 17,14 metrojn, kun kapo 4 metrojn alta kaj oreloj 1,9 metrojn longaj. Ĝi, kiel multaj aliaj budhoj kaj niĉoj en

Lungmen, estis jam parte difektita pro tempopaso. Tiu ĉi plej granda budho kune kun aliaj pli malgrandaj statuoj troviĝas en la sentegmenta Templo Fonsien. Tiu ĉi Templo estis konstruita en la daŭro de 3 jaroj kaj 9 monatoj (672-675 p.K.). La tuta templo longas 35 metrojn kaj larĝas 30 metrojn.



Supre: La aŭtoro antaŭ la plej granda budho luŝena
Maldekstre: Fragmento de kruta monto


Dekstre: La tombo de la granda ĉina poeto Baj Gju-Ji

La arto kunekzisti kun gepatroj

Post la vizito al la Okcidenta Monto, mi transiris la belan ponton kaj atingis la Orientan Monton, sur kies klifoj estas ankaŭ multaj gravuritaj budhaj statuoj. Sed multaj estis jam difektitaj kaj ili ne havas tiel longan historion kiel tiuj sur la Okcidenta Monto. Sed ĉe la Orienta Monto estas alia allogaĵo por mi — la tombo de la granda ĉina poeto de la Tang-Dinastio, Baj Gju-Ji (772-846), kies poeziaj verkoj eternigis lian nomon ne nur en la ĉina literaturo, sed ankaŭ en la monda literaturo. Ĉe lia tomboŝtono mi longe meditis.

Post la vizito al la Grotaro Lungmen, kiu homo ne povas ne admiri la superhoman forton de la laborema ĉina popolo de antikvaj epokoj, kiu per la plej simplaj kaj primitivaj iloj faris tian grandiozan laboron, kiu indas la admiron kaj estimon de la tuta mondo!

Armand Su



Kiam oni atingis la aĝon de 18 jaroj oni sentas tion. Ĝi estas simbola aĝo. Ĝi havas nedifineblan etoson de komencoj kaj finoj. Tion sentas la 18-jarulino kaj tion sentas ankaŭ ŝiaj gepatroj. Ŝi ankoraŭ bezonas siajn gepatrojn — ja ĉiam ŝi bezonas ilin — sed ŝi ne bezonas ilin por la samaj aferoj. (Vi jam longe lernis kiel nodi la ŝuojn, kaj vi scias ke se vi ne frue enlitigos vi malbone fartos morgaŭ).

Via nova pozicio kiel juna plenaĝulo igas viajn rilatojn kun viaj gepatroj tre delikataj. Ĝis kia grado oni permesos al vi libere agi, kaj kiu fiksos la gradon? Estas ja malofta 18-jarulino kiu ne sentas ke ŝi estas meze de konstanta kaj laciga lukto kun siaj gepatroj.

Des pli bone se vi estas unu el la raraj feliĉulinoj. Sed se vi ne estas, vi trovas vin antaŭ elekto. Aŭ vi povas simple ignori la gepatrajn problemojn (ili verŝajne aŭtomate solviĝos post kelkaj jaroj, ĉiuokaze) aŭ vi povas fari vian eblon faciligi la rilatojn. Unuavide, la unua solvo ŝajnas esti la sola ebleco, kaj ĝi estas malpli komplika.

Tamen, iom da atento viaflanke, iom da klopodo **ekkoni** viajn gepatrojn, eble plifaciligus vian ĉiutagan vivon nemezureble.

Compreneble ne ekzistas belaj formuloj. Neniam ekzistas belaj formuloj kiam temas pri homoj. Sed eble la problemo kuŝas en simpla miskompreno. Ĉu vi iam rigardis malnovajn fotojn de viaj gepatroj? Se vi povas pretrevi la eksterordinarajn, eble ridigajn, vestojn kaj ĉirkaŭaĵojn de antaŭ 20 aŭ 30 jaroj, rimarku ke tiuj viaj gepatroj, tiuj kiuj estas en la fotoj tiel junaj kaj feliĉaj kaj okupataj unu pri la alia, havas memoraĵojn kaj vivis vivon jam antaŭ via ekapero.

Ekzistas parto de ilia vivo kiun vi ne dividas, kaj kiun vi ne povas kompreni: iliaj vivoj ne komenciĝis samtempe kun la via. Ĉu vi konas viajn gepatrojn, ne kiel vian patron kaj vian patrinon, sed kiel personojn?

Kaj kiumaniere vi povas vivi kun ili en harmonio se vi eĉ ne konas ilin?

Jes, viaj gepatroj estas ankaŭ homoj — kiuj hazarde ankaŭ estas viaj gepatroj.

Mi ne povas pretendi ke mi estas modela filino, sed la procedo pri kiu mi parolas ĉi tie certe profunde ŝanĝis miajn rilatojn kun miaj gepatroj. Mi eltrovis ke nia antaŭa interrilato ne estis vere **intera**: ĝi estis **unuvoja** — de ili al mi. Eĉ egoisma. Miaj gepatroj dum 18 jaroj zorgis pri mi, profunde sentis ĉion kion mi faris, aŭ diris, aŭ estis. Kaj mi eĉ ne sciis ĉu mia patro ŝatas sukerojn en la kafo... La ŝanĝo en niaj rilatoj, post kiam mi komencis koni ilin kiel homojn, interalie gajnis por mi du novajn geamikojn.



Eble amikeco estas la ŝlosilo. Per tio mi ne sugestas ke vi subite komencu nomi viajn gepatrojn per iliaj vokonomoj (krom se vi jam faras tion), nek ke vi traktu ilin kvazaŭ ili estas 18-jaraj kaj surpriziĝu kiam ili ne subite entuziasmas pri la plej nova modkantisto aŭ la grandioza filmo kiun vi vidis antaŭhieraaŭ. Mi ankaŭ ne sugestas ke vi diru al via patrino kiel ŝi pli bone povus aranĝi la hararon (krom se ŝi petas viajn konsilojn).

Sed simple sidiĝu de tempo al tempo kaj parolu kun ili. Ne pri vi, nek precize pri ili. Sed pri iliaj opinioj, iliaj ŝatoj. Se vi tion faras, ne kiel senhezite, vi lernos kelkajn surprizajn aferojn. Interalie vi ekscios ke ili **havas** opiniojn. Kelkfoje la opinioj de gepatroj pri aferoj kiuj ne rekte rilatas al vi estas malfacile elfoseblaj. Ili hezitas paroli pri ili — kutime ĉar 18 jaroj sen esprimo de tiaj opinioj al vi havas nature silentigan efikon. Sed la opinioj verŝajne estos multe pli proksimaj al la viaj ol vi antaŭe supozis.

Mi ne diras ke ili estos samaj: via patrino ankoraŭ kantas en la kuirejo la kantojn laŭ kiuj ŝi dancis kiam fianĉino, kaj via patro ankoraŭ pensos ke tiu lasta disko kiun vi aĉetis estas simple 35 minutoj da senĉesa brua. Sed unu el la plezuroj de sincera kaj profunda amikeco estas la interfido kiu fontas el cedo kaj el simpla kunekzisto de opinioj.

Junulino

La arto kunekzisti kun la gepatroj

La mondo en kiu troviĝas la hodiaŭa 17-jarulo estas profunde malsama al tiu kiu la gepatroj konis kiam ili estis 16-jaraj. Scienco faris profundajn ŝanĝojn. Kaj tiuj ŝanĝoj havis grandan efikon en ĉiuj medioj: moroj kaj kutimoj ŝanĝiĝis, vivmanieroj ŝanĝiĝis, opinioj ŝanĝiĝis. Rezulte, en multaj familioj la divido inter la generacioj estas preskaŭ ne transirebla. La gepatroj ne komprenas la gefilojn, kaj la gefiloj sentas sin izolitaj de la gepatroj.

Sekve, la gefiloj ofte devas mem gvidi sin tra la komplikaĵoj de la moderna vivo. Tio povas konduki al sento de antagonismo kontraŭ la plenaĝuloj kiuj kvazaŭ abandonis ilin. Okazas problemoj ĉe la lernejo, la gefiloj fariĝas batalemaj kaj nesekuraj.

Do, ege gravas ke la vojoj de komunikado inter vi kaj viaj gepatroj restu malfermitaj. En kiu stato ili estas en via familio? Jen duparta demandaro por helpi al vi en via decido. Ne trompiĝu per la demandoj. Ili aspektas facilaj, sed ili tuŝas fundamentaĵojn.

Unua parto: Gepatroj, demandu al viaj gefiloj:

1. Ĉu Patro preferas sian kafon antaŭ, post aŭ dum manĝado? Se li ne trinkas kafon, kion li preferas trinki?
2. Kiel viaj gepatroj renkontiĝis — kaj kiam?
3. Kiom longe ili estis gefianĉoj?
4. Ĉu Patro ŝatas sporton? Se jes, kiun sporton? Kiun teamon li ĉefe subtenas?
5. Nomu unu el la filmaktoroj kiujn ŝatis via patrino kiam ŝi estis juna?
6. Nomu unu el la herooj de via patro kiam li havis vian aĝon.
7. Kiom kostas ĉiumonate la elektra kurento por via domo?
8. Se Patro estis en la armeo, en kiu unuo li servis? Kiun rangon li atingis?
9. Ĉu via Patro estas lerta pri matematiko?
10. Ĉu ĉiuj liaj geavoj ankoraŭ vivis kiam Patro havis vian aĝon?
11. Nomu du bonajn amikinojn de via patrino kaj du bonajn amikojn de via patro.
12. Se vi iros al universitato, kiajn financajn kaj aliajn fordonojn devos fari viaj gepatroj?

13. Kie okazis la geedza ceremonio de viaj gepatroj?
14. Nomu manĝaĵon kiun via patro tute ne ŝatas.
15. Ĉu vi pridiskutis almenaŭ unu personan problemon kun unu el viaj gepatroj dum la pasintaj du semajnoj?
16. Kiam Patrino havis vian aĝon, ĉu ŝi ŝatis ludi sportojn?
17. Kiuspecajn librojn viaj gepatroj ŝatas legi? Nomu du titolojn de libroj kiujn unu aŭ ambaŭ el ili lastatempe legis.
18. Ĉu viaj gepatroj vojaĝis eksterlanden? Nomu ĉiujn landojn kiujn ili vizitis.
19. Je kioma aĝo via patro kaj patrino ekiris al la lernejo?
20. Patreco kaj patrineco ne estas facila stato. Kiuj estas la du ĉefaj problemoj kiujn havas viaj gepatroj en siaj rilatoj kun vi?



Dua parto: Gefiloj, demandu al viaj gepatroj:

1. Ĉu mi volas iri al universitato? Kiun universitaton aŭ kolezion mi preferus?
2. Ĉu miaj politikaj opinioj similas al la viaj en ĉiuj esencaj rilatoj?

3. Kiujn manĝaĵojn mi preferas?
4. Kiu estas mia plej bona amiko (amikino)?
5. Kiujn instruistojn mi ne ŝatas?
6. Kalkulante proksimume, kiom kostas nuntempe al knabo viziti kinejon kun knabino (inkluzive eventualan vojaĝadon, trinkaĵojn, k.t.p.)?
7. Ĉu mi pasigis la pasintan sabato-vesperon kun knabino/knabo? Je kioma horo mi revenis hejmen? Ĉu tiu estis la unua rendezuo kun ŝi/li?
8. Nomu tri nuntempe popularajn dancojn.
9. Kiom pli alten mi kreskis dum la pasinta jaro?
10. De kiuj lernejoj kluboj mi estas ano?
11. En kiuj temoj mi plej bone sukcesas en la lernejo, kaj en kiuj mi malsukcesas?
12. Kiajn librojn mi ŝatas legi? Kiun libron mi legas nuntempe?
13. Kiam ni pasintfoje ricevis vakcinadon kontraŭ variolo?
14. Diru tri vortojn de laŭmoda junulara slango. Kion ili signifas?
15. Kiom da tempo mi meze pasigas je miaj studaj hejmtaskoj ĉiuvespere?
16. Kiuj estis miaj du plej grandaj sportaj sukcesoj ĝis nun?
17. Nomu du filmojn kiujn mi vidis lastatempe. Ĉu ili estas filmoj de nia lando aŭ de eksterlando? Se de eksterlando, nomu la landojn.
18. Kiun periodon de la historio mi nuntempe studas aŭ laste studis?
19. Eble mi kelkfoje gajnis premiojn ĉe la lernejo, sed ĉu vi scias kiujn premiojn mi preskaŭ gajnis?
20. Juneco ankaŭ ne estas facila. Kiuj estas miaj du ĉefaj problemoj nuntempe?

Poentoj

Donu kvin poentoj por ĉiuj ĝusta respondo, kaj proporcie por parte ĝustaj. Poentaro de 80 ĝis 100 montras ke komunikado estas tre bona, kaj inter 50 kaj 80 ĉio relative bonas. Sed poentaro de malpli ol 50 indikas malfunkcion en la komunikada sistemo. Ĉu eble vi tro multe parolas kaj ne sufiĉe aŭskultas?

Junulo

mozaiko

KOMUNA FOTOGRAFAJO

Kiel kutime la kongreso estis finiĝonta per komuna fotografado. Kolektiĝis la kongresanoj. La sinjorinoj kombis sin, la sinjoroj reliefigis brustojn, entiris ventrojn kaj ĉiuj kun la mienoj anĝele optimismaj daŭris kelkan tempon.

Venis fotografisto, la loka samideano. Li enmetis la kapon en la fotilmanikon kaj subite anoncis, ke li ne fotografos tiel grandan homamason, ĉar li kunprenis erare la familian fotoaparaton anstataŭ la pli granda, kiu restis hejme, dek minutojn pertrame.

Kiel oni scias, familia fotoaparato havas objektivon je 12 personoj, eventuale 13 maldikaj, kaj je nek unu pli. Ĉiuj do ne povis esti fotografitaj pro "objektivaj" kaŭzoj. Helpvenis tamen la demokrataj principoj, kiujn ni ja ĉiam fidele respektas. Ni solvis la problemon salomone: en la sekreta voĉdonado estis elektitaj 13 eminentuloj ŝarĝitaj per honora devo reprezentanti la kongresan popolon sur la komuna fotografajo. Tiamaniere ni estis fotografotaj — oni povus diri — parlamentmetode.

La 13 deputitoj, bedaŭrinde ĉiuj dikuloj, jam estis viciĝantaj antaŭ la fotoaparato. Ni ne povis kaŝi kontenton, ĉar nia reprezentanto, sinjoro H.S., okupis centran pozicion. Tamen ne longe ni ĝojis, ĉar unu momenton poste li ne sukcesis rezisti premon de ambaŭ flankoj kaj elfalis el la vico malantaŭen.

Ekĝemis mi, ekĝemis la aliaj vidante sian reprezentanton elviciĝita. Dank' al Dio, iu konscia alkuris kun seĝo. Saltis sur ĝin sinjoro H.S. kaj ni denove havis okazon fieri, ĉar kvankam nia reprezentanto estis malantaŭ la vico, tamen li estis super ĉiuj.

Ne kapablis tion toleri la aliaj deputitoj. Ili jetis plenkoleran rigardon al nia reprezentanto kaj unu post la alia saltis sur la seĝon. Nur sinjoro A.R. restis malsupre pro manko eĉ de unu kvadrata mikrono da libera spaco sur la seĝo. Li kuris ĉirkaŭe senhelpa. Subite li kaptis poŝtraniĉilon kaj komencis pasie segi la malantaŭan kruron de la seĝo.

Diabloj scias, kiel ĉio finiĝus, se la fotografisto ne komunikus intertempe, ke li jam pretas fotografi, sed sur la fotografajo videbliĝis nur la gamboj, ĉar la fotografatoj troviĝas ĉiuj tro supre.

Tiamaniere pro teknikaj kaŭzoj niaj deputitoj devis forlasi la seĝon. Nur



sinjoro H.S. — nia reprezentanto — ne volis salti sur la teron, kvazaŭ li ŝanĝiĝus je monumento. La fotografisto ordonis al ĉiuj resti senmove, poste li malkovris la objektivon, kovris ĝin kaj per olimpika kvieto aldonis, ke li fortranĉis la kapon de sinjoro H.S.

Indigno jetis min supren je unu metro kaj kvin centimetroj. La fotografajo estis fuŝita. Kiel mi montros tian memoraĵon al miaj infanoj?! Ne miru, do, ke mi entute aprobis la fakton, ke nia deputito prenis la seĝon kaj jetis ĝin sur la fotoaparaton, kiu sekve dispeciĝis je papaveroj.

Per tiu ĉi — ni konfesu — forta akcento finiĝis la kongreso. Pardonu: mi forgesis aldoni, ke antaŭ la finiĝo de la kongreso okazis bankedo — kompreneble per la buŝoj de niaj reprezentantoj.

Roman Dobrzyński

Historieto el Vieno: Maljunulino eniras plenplenan tramon kaj staras antaŭ sidanta junulo. Li senhezite ekstaras kaj oferas al ŝi la sidlokon. Si tuj kolapsas pro surprizo. La junulo metas ŝin en la sidlokon. La virino malfermas la okulojn. "Ho, mi multe dankas," ŝi diras. Tiam la junulo svenas.

Averto al la idealistoj (inter ili, la esperantistoj): "Neniu homo okupata pri laboro kiun li ne ŝatas povas konservi multajn komfortajn iluziojn pri si mem. L malagrablo, la manko de ĉarmo kaj brilo, etendiĝas de la okupo al la personeco. Nur tiam kiam niaj difinitaj aktivecoj ŝajnas pro feliĉa bonŝanco akordiĝi kun la aparta seriozo de nia temperamento, ni povas gustumi la kontentigon de kompleta sintrompo." (Joseph Conrad)

ESTRARO DE T.E.J.O.

Ivo Osibov, prezidanto, Splitskog odreda 15, Split, Jugoslavio

Carlo Minnaja, ĝenerala sekretario, Viale Giulio Cesare 223, Roma 6, Italio

Marek Pietrzak, vicprezidanto, Dworcowa 1, Kluczbork, Pollando

Humprey Tonkin, vicprezidanto, 7 Linnaen Street, Cambridge 38, Mass., Usono

Ulrich Lins, kasisto, Gemarkenstr. 146, 5 Köln-Dellbrück, Germanio

Hans Bakker, eksteraj rilatoj, Kastelenstraat 231, Amsterdam Z., Nederlando

Yoshimi Umeda, agado en Azio kaj Oceanio, ĉe Oomoto, Kameoka, Kioto-hu, Japanio

Svobodan Zlatnar, kulturaj kaj lernejoj aferoj, Rimska 7, Ljubljana, Jugoslavio

LANDAJ SEKCIOJ DE T.E.J.O.

AŬSTRALIO :

Daniel Kane, 5/55 Hardwick Street, North Melbourne

AŬSTRIO :

Hans Michael Maitzen, Mozartgasse 4, Graz

BELGIO :

Roger van Humbeeck, Dambruggerstraat 296, Antwerpen

BRITIO :

2 Edwina Gardens, Ilford, Essex

BULGARIO :

p.k. 587, Sofia

FRANCIO :

JEFO, 34 rue de Chabrol, Paris X

GERMANIO :

Dieter Kleemann, Fritz-Kalle-Strasse 26, 62 Wiesbaden

HISPANIO :

Salvador Aragay, Arce 8-2-4, Cornella, Barcelona

HUNGARIO :

HEA, Petöfi Sándor u. 17, Budapest 5

ITALIO :

Via Po. 7, Torino

JAPANIO :

1-13 Motomachi, Bunkyo-ku, Tokio

JUGOSLAVIO :

Terazije 42, Beograd

KOREO :

Taekeng Kim, 104-43 An Am-dong, Seong-Puk, Seoul

MADAGASKARO :

B.P. 1678, Tananarive

NEDERLANDO :

Kastelenstraat 231, Amsterdam-Z.

NORDAMERIKO :

Shell, 2535 Hillegass, Berkeley 4, Calif.

POLLANDO :

Dubois 3, Wrocław

SVEDIO :

Jan Milld, Grimstagatan 35, Vällingby

SVISLANDO :

Edwin Thomas, Bielstrasse 16, 3250 Lyss

(NOVZELANDO :

P.O. Box 181, Upper Hutt)

La aŭtoj kiujn amas la francinoj

Raporto Kinsey pri

Aŭtomobila trafiko fariĝis tiel densa en Parizo ke promenantoj regule svenas pro la fumgasoj.


S-ino Debray, ano de la Pariza Urba Konsilantaro, oficiale raportis plurajn svenojn en la Placo de la Operejo. "La problemoj fariĝis afero de vivo aŭ morto," ŝi deklaris.

La direkto de la fama Café de la Paix konsentis. Malgraŭ varma kaj sunplena vetero, ĝiaj klientoj komencis forlasi la trotuarajn tablojn kaj iri internen por ŝirmi sin de la malpura atmosfero.

Kial la francoj bubale kuregas por aĉeti pli da aŭtoj kiam ili ne povas trovi lokon por veturigi tiujn kiujn ili jam havas?

La parizano, ĉiam okupate pri amaj demandoj, respondas ke oni devas havi la ĝustan aŭton por allogi la knabinon kiu plenumos la ĉi-vesperajn revojn.

La aktivuloj, nomataj "les dragueurs", kiuj dragas la bulvarojn serĉante etajn belajojn, raportas ke bele ekipita sportaŭto estas nuntempe la plej efika batalilo.




La aŭtomobilo kun la plej rapida alkroĉo kiam temas pri knabinoj estas la Ferrari. "Dragueur" en Ferrari bezonas neniujn aliajn apartaĵojn — eĉ ne la bronzan vizaĝon aŭ la grizan strieton en la hararo, aŭ eĉ la preskaŭ nevideblan rideton.

Virinoj hipnotiĝas pro simpla kontakto kun la interno de la aŭto. La muĝo de la motoro kompletigas la efikon. Por certigi la aferon, la gantŝranketo enhavu kelkajn tuketojn Hermes por ŝirmi la hararon de la damo kontraŭ la vento.

La Alfa-Romeo Giulietta estas preskaŭ tiel efika kiel Ferrari, kvankam ĝi perdis iome sian masklecon post kiam virinoj komencis veturigi ĝin. Necesas aldono de larĝaj ŝultroj, ŝvelaj bicepsoj kaj silka ĉemizo kun la ĝusta monogramo por nevenkebli centprocente en tiu aŭto. Ĝiaj plej bonaj ĉasejoj estas la snoba kvartalo Neuilly kaj laŭ la flankaleoj de la Champs-Élysées.

Usonaj aŭtoj ne alportis bonajn rezultojn, de post kiam multekostaj putinoj komencis utiligi ilin por elĉasi riĉajn klientojn en la bulvaroj de Parizo.




Kvankam Corvette lokas junulon en la klaso "filo de paĉjo", ĝi malsukcesas imponi al vera "mondanino". Sed ĝi bone funkcias ĉe Pigalle kaj en Montmartre. Ĝia plej granda utileco estas eksterurbe je semajnfinoj, speciale en iom malgrandaj vilaĝoj. Unu malrapida rondiro de urboplaco dum malfrua posttagmezo senescepte enretigas gustoplenan kaptaĵon se oni sperte fiŝkaptas.

Ankaŭ germanaj aŭtoj momente malsukcesas krei novajn belajn amikecojn aŭ influi allogajn francinojn. Tamen kelkaj "dragueurs" raportas sukcesojn per Mercedes en la Placo de la Respubliko dum la horoj kiam lacaj oficistinoj atendas aŭtobusojn por iri hejmen. La Jaguar (konata simple kiel "le Jag") kaj la Aston Martin (nomata la aŭto James Bond) estas


ekzotikaj aŭtoj

preskaŭ tiel fruktodonaj kiel la Ferrari, precipe se la vira kondukanto portas anglajn sportvestojn kaj la aŭto havas italan klaksonon. Sed ĉiam oni riskas esti supozata anglo. En tiu okazo oni devos pagi 20-procente pli altajn prezojn en la diskretaj tranoktejoj kaj hoteloj kiuj ĉirkaŭas Parizon.



Plej bonaj ĉasejoj kun ĉi tiuj aŭtoj estas Passy kaj ĉirkaŭ la modejoj, kiujn la beletaj klientinoj kaj eĉ pli beletaj modelinoj frekventas.


La malhelverda Triumph estas konsiderata "eta venkanto" kaj taŭgas por kondukanto portanta vestojn el skota ŝtofo kaj konkur-sajn gantojn. La eta Morris Cooper estas la aktuala favorato por aspirantaj ludemuloj kiuj alkroĉas studentinojn en la Latina Kvar-talo kaj konvinkas siajn junajn predojn ke ili uzas "le Jag" nur la semajnfinojn.



Inter la francaj aŭtoj, la reĝo de "dragado" estas la luksa Citroen kun ties moveblaj sidlokoj (nomataj "hotelaj sidlokoj") kiuj estas tre praktikaj por urĝaj romantikuloj. Estas krome baro kun trinkaĵoj en la instrumentpanelo por akceli la aferon.

Tiu Citroen estas konata kiel ideala batalilo por la homo kiu nur duone seriozas kaj sentas sin nur duone edzo. Ĝi apelas al virinoj de ĉiuj aĝoj kaj ĉiuj sociaj niveloj — kontraste al la Peugeot 404, kiu allogas plejparte la "maturan eksedzinon" kiu serĉas burĝan sekurecon.

La "dragueur" kiu posedas nenion pli bonan ol Renault devas alfronti la problemon ekipita per grandiozaj sprito, ĉarmo kaj imagopovo. La plej lertaj lernis farbi grandan strion ĉirkaŭ la aŭto, meti grandan numeron sur la



flankon, kaj ĵeti konkursan kaskon ĉe la malantaŭan fenestron kie ĝi estas facile videbla.

Francinoj amegas konkursantojn, kaj se la koncerna knabo havas metodon egale glatan kaj rapidan kiel la Ferrari, la knabino eble forgesos ke la Renault relative helikas.

En Pariza trafiko nenio moviĝas ĉiuokaze. Plej amuza estas la parkumado. **Ferris Hartman**

NIAJ KONTRIBUINTOJ

Cécile Pérez estis dum multaj jaroj aktiva en la Esperantomovado (ŝi edziniĝis al esperantisto) kaj en la Muelejoj de la Metilernantoj. La ilustraĵojn por ŝia artikolo sendis al ni la mueleja organizo.

La artikolo La mondo de la infano unue aperis en la revuo L'Éducateur, de la Internacia Federacio de Modernlernejaj Movadoj (FIMEM). **Madeleine Porquet** estas inspektorino de infanlernejoj. La fotojn ni ricevis de FIMEM kaj prenis el inter la premiitaj fotoj de la Konkurso Gevaert, kiu okazis en 1964. La konkursan foton faris Juhász Miklos. La foto sur paĝo 6 estas el la arkivo de Kontakto, samkiel la foto sur paĝo 8.

Daniel Kane kaj **Hans Michael Maitzen** estas bone konataj gvidantoj de respektive la aŭstralia kaj la aŭstria TEJO-sekcioj.

La artikolo Energio en ekologio unue aperis en la Londona gazeto The Listener, kiel represo de radioprelego de la Brita Brodkasta Korporacio (BBC). **P. J. Newbould** estas docento pri botaniko ĉe universitata kolegio de la Universitato de Londono.

Gop estas juna nederlanda koncertvizitanto.

Al la usona ĵurnalo San Francisco Chronicle ni ŝuldas la tekston de Raporto Kinsey pri ekzotikaj aŭtoj. Ni aparte dankas al ties redakcio, kaj al la aliaj redakcioj de kiuj ni reprenis materialon.


Armand Su estas aktiva ĉino kiu fidele kontribuas.



Kolombio


La funkciigo de tradicia eduka sistemo en lando kiel Kolombio, kun ties montoj, ĝangaloj kaj izolitaj vilaĝoj, estus ja malfacila. Tial la kolombia registaro adoptis modernajn metodojn por eduki grandajn partojn de la loĝantaro. Sep radiostacioj nun dissendas ĉiutage edukajn programojn al 800 miloj da homoj. Pro ĝia tutnacia venda kaj serva organizo, oni konfidis al Philips la liveron de pli ol 50,000 speciale konstruitaj radio-riceviloj.

Tage kaj nokte oni uzas sennombrajn, plej diversajn produktojn de Philips en la tuta mondo. Inter ili estas: lumigaj ekipaĵoj, radio-aparatoj kaj televidiloj, gramofondiskoj, aparatoj por la mastrumado, elektraj raziloj, elektrontuboj kaj duonkondukiloj, industriaj kaj sciencaj instrumentoj, telekomunika ekipaĵo, radaro, publikparolaj sistemoj, medicinaj X-radiaj instalaĵoj, kemiaj kaj farmaciaj specialproduktoj.



La ĉi-supra ilustraĵo montras sinkrociklotronon de Philips, por la akcelado de protonoj ĝis 150 MeV kaj deŭteronoj ĝis 80 MeV, en la Nuklefizika Laboratorio de la Fakultato de Sciencoj de la Pariza Universitato.

Franco



La grandega stadiono "Foro Italiceo", apud Romo, kie okazis la Olimpikoj de 1960, estas ekipita per publikparola aparato de Philips, por certigi la ĝustan disaŭdigon al ĉiu parto de la vastega amfiteatro.

Italujo

Fido al **PHILIPS** estas tutmonda

